


CERBE kaj KORE



KULTUR& SUPLEMENTO
AL BULTENO DE RUSIA ESPERANTISTA UNIO N-RO 104

N-RO 8 (76), MAJO 2019

Enhavo

Jubilee

Aleksandr Puŝkin (1799-1837)

En frisko dolĉa de fontano. Trad. N. Neĉajev	3
Scivolemulo Trad. V. Melnikov	4
Jen Muz', babilulino droĉa. Trad. V. Melnikov	4
Kristo resurektis. Trad. V. Melnikov	5

Originala poezio. Dulingva verko

Aleksandro Mitin

Rimoteksisto	5
Vortetas	6

Espopore

Purpura sunsubir'	7
"Rapidas la montriloj de horloĝ'"	7
Romo	8
Sur la pint' de poezi'	8
"Kvazaŭ faringo sorta en la buŝo raba"	8

Klara Ilutoviĉ

Mistiko	9
Fino de marto	10

Tradukita poezio

Eŭgenij Vinokurov. Terlimoj. Trad. K. Ilutoviĉ	10
Larisa Miller. "Vivo estas malsaĝ', tragedi'" Trad. K. Ilutoviĉ	12

Historio

Unua lernolibro de Esperanto por japanoj. <i>Gennadij Ŝlepĉenko</i>	12
---	----

Kultura projekto

Rusaj popolaj kantoj de la 20-a jarcento	14
Adiaŭo/Siringa nebular'. Tradukoj de B. Tornado kaj G. Ŝilo	15
Ĉu mi kulpas? Trad. S. Vajnblat	18

Humuro

Danĝeraj rimoj. V. Melnikov	20
-----------------------------	----

Jubilee

Aleksandr Puŝkin (1799-1837)

*La 6-an de junio 2019 okazas 120-jariĝo post
naskiĝo de A.S. Puŝkin*



В прохладе сладостной фонтанов
И стен забрызганных кругом,
Поэт, бывало, тешил ханов
Стихов гремучим жемчугом.

En frisko dolĉa de fontano,
La murojn kovras guta ros'.
Poetajn versojn ĝuis ĥano,
Poemoj perlis pro patos'.

На нити праздного веселья
Низал он хитрою рукой
Прозрачной лести ожерелья
И чётки мудрости златой.

Surfadenigis li poemon
Per sia lerta ruza man',
Donacis li flateman ĝemon,
Donacis saĝon li al ĥan'.

Любили Крым сыны Саади,
Порой восточный краснойбай
Здесь развивал свои тетради
И удивлял Бахчисарай.

Kaj filo suda de Saadi
Admiris ĥanon per rim-faj.
Kaj emis ĥan' en rev' vagadi,
Eskapi el Baĥĉisaraj'.

Его рассказы расстилались,
Как эриванские ковры,

Poemoj bardaj floraj kuŝis
Tapiŝe kiel Armeni',

И ими ярко украшались
Гиреев ханские пиры.

Но не один волшебник милый,
Владетель умственных даров,
Не вымышлял с такою силой,
Так хитро сказок и стихов,

Как прозорливый и крылатый
Поэт той чудной стороны,
Где мужи грозны и косматы,
А жёны гуриям равны.

Любопытный

— Что ж нового? «Ей-богу,
ничего».
— Эй, не хитри: ты, верно, что-то
знаешь.
Не стыдно ли, от друга своего,
Как от врага, ты вечно всё
скрываешь.
Иль ты сердит: помилуй, брат, за
что?
Не будь упрям: скажи ты мне хоть
слово...
«Ох, отвяжись, я знаю только то,
Что ты дурак, да это уж не ново».

* * *

Вот муза, резвая болтуня,
Которую ты столь любил.
Раскалясь моя шалуня,
Придворный тон ее пленил;
Ее всевышний осенил
Своей небесной благодатью —
Она духовному занятию
Опасной жертвует игрой.
Не удивляйся, милый мой,
Ее израильскому платью—
Прости ей прежние грехи
И под заветною печатью
Прими опасные стихи.

Orelojn ĥanajn fajne tuŝis
Poeta versa simfoni'.

Ne povis krei ajna mago
Pli ravan belon por palac'.
La versoj brilis pro l' imago,
La kantoj estis bel-donac'.

Krimeo mian revon ravas,
Similas lando al eden',
En kiu viro sveltas, bravas,
Virin' hurias en ĝarden'.

Esperantigis Nikolao Neĉaev

Scivolemulo

Do, kio novas? – “Vere ja, neni’!”
– Ne ruzu, he, vi certe havas scion.
Ja hontu: de l’ amiko bona vi,
Samkiel de kanajlo, kaŝas ĉion.
Aŭ vi koleras – sed indulgu, frat’!
Ĉu vi por mi almenaŭ vorton trovas?..
“Aĥ! Lasu min, mi scias je rilat’,
Ke stultas vi – sed tio jam ne novas.”

* * *

Jen Muz’, babilulino drola,
Vi ŝin amegis kun sindon’.
Sed pentis amikin’ petola,
Ŝin ravis la kortega ton’;
Favoris dio ŝin per kron’
De sia granda ben’ ĉiela –
Ŝi al agad’ spirito-cela
Oferas ludon je fortun’.
Ne miru, kara mia, nun
Pro ŝia robo israela, –
Vi ŝiajn pekojn kun sincer’
Pardonu, kaj sub gard’ sigela
Akceptu versojn de danĝer’.

Христос воскрес

Христос воскрес, моя Ревекка!
Сегодня следуя душой
Закону бога-человека,
С тобой целуюсь, ангел мой.
А завтра к вере Моисея
За поцелуй я не робея
Готов, еврейка, приступить —
И даже то тебе вручить,
Чем можно верного еврея
От православных отличить.

Kristo resurektis¹

Krist' resurektis, ho Rebeka!
Hodiaŭ, laŭ anim-impet',
Pro leĝ' de dia fil' senpeka
Mi kisas vin, ho anĝelet'.
Kaj morgaŭ kredon de Moseo
Mi pretas veni tuj, sen veo,
Pro via kiso je stimul' –
Eĉ enmanigi sen skrupul'
Al vi la trajton de hebreo,
Distingan de ortodoksul'.

¹ Estas malnova tradicio inter rus-ortodoksaj kristanoj: gratulante unu la alian okaze de Pasko (per la vortoj “Kristo resurektis!”), interkisiĝi, eĉ kun nekonatoj. Pri cirkumcido de hebreoj, evidente, klarigoj ne necesas. – La tradukinto.

Esperantigis Valentin Melnikov

(Antaŭe publikigita en “Beletra Almanako” 19, p. 64-65. Novjorko, Mondial, 2014, ISBN 978-1-59569-277-1)

Originala poezio

Aleksandro Mitin (*Niĵnij Novgorod*) **Rimoteksisto**



Malgraŭ spiro, naskanta inspirojn,
Malgraŭ krea malord' en anim',
Miajn tristojn, angorojn, dezirojn
Mi malofte esprimas per rim'.

Kial verki? Eŭterpo silentas,
Nevidebla trans densa nebul';
Samtempo-aŭtor' samon sentas,
Kion sentis talent'-antaŭul'.

Oni legas, deklamas, aŭskultas
Versojn de iu fora jarcent',
Dum ideoj pli freŝaj malmultas...
Kio restas por nova talent'?

Kiel verki? Ĉu stilojn renversi?
Kaj post jar' ne komprenos vi mem...
Ĉu nur proprajn elpensojn priversi –
Dum monat' nur po unu poem'?

Se vi havas sufiĉe da sperto,
Sen vortar' povas vi dum sekund'
Trove rimojn krom "certo" kaj "lerto",
Ĉu ekĝermos dezerta kor-grund'?

...Malgraŭ ofta inspira impeto,
Malgraŭ mempedantem' kaj insist',
Mi ne iĝos verkist' aŭ poeto –
Oni nomu min "rimoteksist"

25-27.09.2013

Vortetas

Printempo disfloris.
Vi min tiel **poris**!
Mi **ĉuis** pri tia sukces'.

La am' ĉe mi trois.
Feliĉo vin **prois**.
Ni ĝuis la vivon sen ĉes'.

Mallongis beato...
Kaj finis **ĉeado**
La jaron post ringoj sur aŭt'.

La patroj ek**bois** —
Kaj ni tuj ekbojis,
Ekkriis la paŭt' al la paŭt'.

Vi ĉiam ĉagrenis,
Se mi ek**tamenis**
Anstataŭ servila obe',

Kaj min ege tedis,
Ke vi akre **sedis**
Al ĉiu bonega ide'.

Hodiaŭ ni **disas**.
Kverelojn ni **ĝisas**.
Jam **eksas**, ne **geas** ni plu,

Aparte mastrumas...
La viv' mia **dumas**,
Mi **laŭas**. En splen kaj enu'...

Knabinoj **tiomas** —
Neniu vin **kromas**!
Kaj vi restas sola ĝis nun.

Vi eble ekneos,
Sed sciu: ni **reos**!
Post **senoj** pli fortos la **kun**'!

Mi **alas**! Atendu!
Kontraŭojn forsendu,
Ĉar ilin **malgraŭos** la sort'.

La koro degelu —
Mi ĝin ne plu **elu**
Kaj mem restos via ĝis mort'.

23–24.02.2017

Espopore
(*Kazahio, Karagandao*)

Purpura sunsubir'



Senpezas nuboj en purpura sunsubir',
Obezas duboj dum la horoj de langvoro.
Kaj ŝajnas kvazaŭ sang' de iu soleca bird'
Intermiksiĝis kun lazur' de korfavoro.

Pli mildaj tonoj nun sentebblas en la tut',
Sin mil' da ŝtonoj sub l' animo poluradas;
La ruĝ' renaskas periodon, la tribut'
De kies perloj kaj putraĵoj plu paradas.

La rememoroj nun viciĝas al altern':
Jen senesprima, sed jen – drasta, elokventa,
Eĉ sunsubiro foje iras al malferm'
De l' pord' supera per ŝlosil' – kolora vento.

Rapidas la montriloj de horloĝ'
Por ne malfrue veni al festen' .
Kiel seriaj triloj en la song',
Vekvokas brila sono je maten' .

Superbas sonoriloj apud lim'
Inter la nova jaro kaj ĉi jar' .
Per ĝojo plenas koro kaj l' anim',
Verve disdonas ion la Hazard' .

Romo

Ho, Romo! Nuancaro mia!
Sordidas suno, brilas la patin' ...
Ĉirkaŭe en la polv' jarcenta fia
Konstante maturiĝas vin',
Kaj ene eterniĝas placo plia.

Sep holmoj kaj sennombraj tronoj
Etendas sin ĉe koro de la mond' .
Sur solidaĵo devas stari ŝtonoj
Por ke samstatu l' origina ord',
Kaj ne velkadu la koloraj tonoj.

Alvokas Palatino frandi,
Hezitas penso mia en ruin'
Gloreĝon vian kun la hont' kunfandi;
Mi eĉ ne scias kiel pritrakti ĝin
Kaj povos nur en Forumo demandi...

Sur la pint' de poezi'

Mi ebriegas... Esperanto lulas.
Buŝ' mia, kiel iu fabela font' ,
Salivon ravan naskas. Kaj ĝi fluas...
Ne por la samtempulo, por estont' .

Kaj aĉa kaĉo el la vortoj densas.
Radikoj miaj dronas en ĥaos'
De bakanal' sen rimo, ritmo, senco,
Pikante per monstreco ĝis la ost' .

Memoro mia feblas, sed ja eblas
Eĉ nun reveni al tiu ĉi vizi' :
Mi, kiel brut' , senmovas kaj plenmeblas,
Sed ĝojas sur la pint' de poezi' ...

Kvazaŭ faringo sorta en la buŝo raba,
Rekonu vivon en silenta bru',
Konante morton en bruego samba.

Provante negi belon de la nokt',
Bonvolu ĉasi brilon de la karbo,
Vidante tagon sur mondbildo farba,
Eksentu ŝajnon de nokttaga lok'.


Atentu voĉon de la infanec',
Vivmortu hela kaj fantoma pec'
Ekster surteraj moroj kaj kutimoj.

Monaĥo, majstro, sklavo aŭ Cezar'?
'Ca nom? Ku sat-ci?' – 'Estams cheyuy cùar!'
Bizara nubo en la mensaj limoj...

*Tie ĉi estas uzataj la artprojektoj subnome Popido kaj Arkaika
Esperanto fare de Manuel Halvelik

Klara Ilutoviĉ

Mistiko



Forveturonte, hom' deziras,
Ke lia voj' sukcese kuru,
Sed io ena laŭte diras:
Atendu! Haltu! Ne veturu!

Kio avertas pri l' pereo
En akcidento senevita
Pro fulmo aŭ motorpaneo,
Per kiu sens' neklarigita?

Kial mortintoj-transmonduloj
Al iu venĝas, iun savas
Per la konsiloj aŭ postuloj,
Kiu misteran forton havas?

Ne kompreneblas emocioj,
Vivantaj kaŝe kaj mallume,
Kaj ne eksplikas ilin scioj –
Ĉu ne eksplikas nun, ĉu dume?

Evidentiĝas plu mistike
De temp' al tempo fenomenoj,
Ne konsciataj nun fizike,
Super esploroj kaj kompreno.

La homa mens' ĉiam plu febla
La veron vidas kaj emfazas:
La okazaj' neokazebla
Tamen okazas!

Fino de marto

Neĝo porece nigras
Kvazaŭ preta suspiri.
Vintro obstine pigras
Ĝustatempe foriri.

Estas ĉe sojl' aprilo,
Lum' ĉielon konkeras,
Sed blua glacibrilo.
Kiel vintre, aperas.

Flako ridetas milde
Ĉe altega neĝduno.
Ili apudas bilde
Ornamote de suno.

Pluv' monotone gutas.
Roj? Glaci'? Nuda tero.
Nub' neĝflokajn ŝutas
Balanciĝ' de l' vetero.

Tradukita poezio



Евгений Винокуров (1925–1993)

Земные пределы

Jevgenĵij Vinokurov

Terlimoj

Есть похоть беспредельности —
ходьба.
По валунам, по пахоте, по мёжам.
Какая это радость, что судьба
Тебя случайно уродила пешим!

En la senlim' ekzistas tenta fort' –
Laŭ ŝtonoj, laŭ plugej', vojad' l' altira,
Kaj kia ĝoj', ke la destino – sort'
Hazarde naskis vin la piedira.

И коль в ходьбе ты понимаешь смак,
Иди, тоской пространственной
влекомый...

Se al vojad' vin vokas franda ond',
La spacsopiro vin vojigu bene.
Flor' dormetanta sur dekliv' de mont',
Renkontas vin, kiel konat', matene.

На горном склоне задремавший мак
Тебя с утра встречает, как знакомый.

А что там путь? Переставлень ног
До той черты, где облаков престолы.
И ты идешь, велик и одинок.
Тебя вбирают в глубь себя просторы.

И, наконец, усвоенный совсем
И без остатка растворясь в пейзаже,
Ты станешь вдруг невидим, глух и
нем...

Но это ты и не заметишь даже.

Kio 'stas voj'? De kruroj translokad'
Al horizont' kaj altaj nubotronoj.
Vin, grandan kaj solecan, la vivpad'
En sin enigas je l' vastegimponoj.

Alproprigite de l' pejzaĝdefi',
Tutmergiĝinte en la vojpasion,
Nevidebliĝos, surdos, mutos vi,

Sed fakte vi eĉ ne rimarkos tion.

Tradukis: Klara Ilutoviĉ



Foto de Lenke Szasz



Жизнь - бессмыслица, вздор и беда,
Но не следует в бездну кидаться.
Ведь, возможно, пришли мы сюда
Не за смыслом, а чтоб повидаться
С тихим садом и небом над ним,
Со шмельём, что летает над лугом,
С пожелтевшим листом, что гоним
Ветерком и, конечно, друг с другом.

Larisa Miller
Larisa Miller

Vivo estas malsag', tragedi',
Sed ne bruu panika tempesto.
Eble venis ĉi tien ja ni
Ne por senc', sed por nia kunesto
Kun kvieta ĝarden', firmament',
Burdo super herbej' sunradika,
Kun folio, pelata de vent',
Kaj, sen dub', unu kun la alia.

Tradukis Klara Ilutoviĉ

Historio

Unua lernolibro de Esperanto por japanoj

Gennadij Ŝlepĉenko



La sorto ne ofte donacas eblecon renkontiĝi por du rimarkindaj homoj en certa tempo kaj en certa loko. Tiel okazis, ke en Vladivostoko konatiĝis du personoj: rusa kapitano-inĝeniero Fjodor Alekseeviĉ Postnikov kaj japana verkisto kaj tradukisto Futabatei Ŝimei.

Fjodor Postnikov (1872-1952) naskiĝis apud urbo Kovno (nun Kaŭnas). En 1891 li sukcese finis kursojn de militernejo de Imperiestro Pavel en Sankt-Peterburgo, kie konatiĝis kun kreanto de Esperanto Ludoviko Zamenhof, kaj kun la lingvo Esperanto. En sama jaro oni sendis lin por militservi en urbeto Kamenj

Ribolov. En Vladivostoko en la loko de militservado Fjodor Postnikov organizis klerigan agadon kaj propagadon por la internacia lingvo.



En 1892 en Sankt-Peterburgo estis fondita societo “Espero”, al kiu oni permesis krei siajn filiojn. Tial en 1901 grupo de esperantistoj, kiu enhavis 26 personojn, kreis la filion en Vladivostoko. Prezidanto de la societo estis elektita ano de la Societo de esploro pri Amura regiono Fjodor Alekseeviĉ Postnikov, estro de aviada parko, milita inĝeniero, kapitano.



En 1870 jaroj en Tokia Lernejo de fremdlandaj lingvoj laboris instruisto Nikolao Ĉajkovskij (1850-1926) kiu havis pseŭdonimon Nikolao Grey. Dank'al liaj inspiraj lecionoj akiris amon al rusa literaturo Hasegawa Tacunosuke – estonta fama tradukisto de Turgenjev, Gogol kaj aliaj klasikuloj de rusa literaturo de XIX jarcento. En historion de japana kulturo li eniris kun pseŭdonimo Futabatei Ŝimei. (1864-1909).

En Vladivostoko li konatiĝis kun Fjodor Postnikov, kiu en tiu tempo gvidis societon de esperantistoj en nia urbo. En 1902 Futabatei iĝis ano de la societo, kie ellernis la lingvon. En 1906 li verkis la unuan en Japanio Esperanto-lernolibron kaj krestomation. Somere de la sama jaro en Tokio

de eldonejo “Saiunkaku” estis eldonita la lernolibro. Futabatei verkis ankaŭ kelkajn artikolojn pri la lingvo, kiujn oni publikigis en periodaĵoj.





氏 フコニトスゴ 顔マ會協トシラベスニ港浦

En 1905 Fjodor Postnikov forveturis en Usonon, sed lia korespondado kun Futabatei daŭris. Ili revis pri tio, ke helpe de Esperanto oni fondu vastajn internaciajn kontaktojn.

Dank⁷ al vic-direktoro Aikawa Takuya de Japana Esperanto-Instituto, oni havas eblon konatiĝi kun enhavo de la lernolibro, kie sur unuaj paĝoj krom portreto de Zamenhof troviĝas portreto de Fjodor Alekseevič Postnikov kun subskribo “S-ro Postnikov, estro de Esperanto-societo en Vladivostoko”.

La artikolo estas publikigita en la rusa lingvo ĉe:

<http://ouak.pf/news/2019-04-28/pervyy-esperanto-uchebnik-dlya-yapontcev> (la paĝaro de Приморское краевое отделение Русского географического общества - Общество изучения Амурского края)

Kultura projekto

Rusaj popolaj kantoj de la 20-a jarcento

Karaj amikoj!

Ĉi-foje ni prezentas du famegajn lirikajn kantojn, kiuj ĝis nun estas vaste konataj kaj kantataj en la popolo. La unua – “Siringa nebulo” populariĝis fine de 1950-aj – komence de 1960-aj jaroj (ne hazarde tiutempe B. Tornado faris kaj publikigis ĝian E-tradukon!), sed poste iom forgesiĝis (ekzistas iuj atestoj, ke meze de 1950-aj jaroj ĝi sonis en iu radielsendo, sed la registraĵo ne konserviĝis). En 1989 ĝin plenumis publike kantisto Vladimir Markin, kaj komenciĝis nova vivo kaj eksterordinara populareco de la kanto. Markin eĉ lanĉis serion de televidelsendoj kun tiu nomo! En la epoko de la “dua populareco” de la kanto aperis nova E-traduko fare de G. Ŝilo.

Tamen post komenco de nova famo de la kanto aperis pretendantoj je la aŭtoreco. Vidvino de fama poeto Miĥail Matusovskij pruvadis (kaj eĉ sukcesis trarabati sian aserton oficiale!), ke la aŭtoro de la teksto estis ŝia edzo, kaj de la muziko – lia amiko Jan Sašin, kaj ili verkis ĝin jam en 1936-a aŭ 1938-a jaro¹. Iom poste tiun

¹ Nerekta pruvo, ke tio estas blago, estas tio, ke kanto kun TIA enhavo (adiaŭo kun knabino) ne povis ne fariĝi populara dum la dua mondmilito. Sed dum la milito pri tiu kanto neniu aŭdis...

aserton renversis la filo de komponisto Jurij Lipatov, kiu diris, ke la vortojn kaj muzikon de tiu “Voja tango” verkis lia patro fine de 1940-aj jaroj, kaj eĉ trovis iun realan virinon, al kiu estis dediĉita la kanto. Eĉ pli: iu Miĥail Landman poste asertis, ke la aŭtoro de la kanto (kiu originale nomiĝis “Ekspreso de la tempoj”) estas li kune kun Miĥail Jarmuŝ en 1951²... Cetere, ekzistis ankaŭ aliaj pretendantoj je aŭtoreco, eĉ malpli fidindaj.

Estas, tamen, interese, ke nek M. Matusovskij, nek Ju. Lipatov MEM pretendis je la aŭtoreco, tion faris iliaj heredantoj – kaj nur tiam, kiam la kanton vaste ekplenumadis renomaj kantistoj...

Necesas noti, ke ekzistas, krom “klasika” kvarstrofa kanto, plenumita de V. Markin, pluraj variantoj de la teksto kaj melodio, kvankam la ĉefa enhavo – adiaŭo apud forironta trajno kaj tanga melodio – ĉiam restas la sama. Do, ni konsideru la kanton vere popola, kaj, eĉ se iu el la famaj pretendantoj faris iun kontribuon por ĝia apero, ĝi dekomence folkloriĝis kaj vivis dum minimume 30 jaroj kiel vera senaŭtora kanto.



Сиреневый туман

Сиреневый туман над нами проплывает,
Над тамбуром горит полночная звезда...
Кондуктор не спешит, кондуктор понимает,
Что с девушкою я прощаюсь навсегда.

Ты смотришь мне в глаза и руку пожимаешь;

² Amuza afero: la linio, kiu en ĉiuj variantoj sonas kiel “над тамбуром горит полночная (дорожная) звезда” (“super la platformo brilas meznokta (voja) stelo”), en la “aŭtora” varianto de Landman sonas “над тамбуром горит *зелёная* звезда” “super la platformo brilas *verda* stelo”!

Уеду я на год, а может быть, на два,
А может, навсегда ты друга потеряешь...
Еще один звонок, и уезжаю я.

Последнее «прости» с любимых губ слетает,
В глазах твоих больших тревога и печаль...
Еще один звонок, и смолкнет шум вокзала,
И поезд улетит в сиреневую даль.

Сиреневый туман над нами проплывает,
Над тамбуром горит полночная звезда.
Кондуктор не спешит, кондуктор понимает,
Что с девушкой я прощаюсь навсегда.

Adiaŭo

Nebula duonlum' ĉirkaŭe malserenas,
Kaj tremetanta stel' en sol' rigardas nin.
Ne hastas konduktor', li certe ja komprenas,
Ke adiaŭas mi por ĉiam kun fraŭlin'.

Malgajas la rigard', kaj manon premas mano.
Ĉu renkontiĝos ni? Sed eble nur post jar'?

Mi eble perdos vin en homa oceano...
Kaj jen vi staras nun ĉe nokta vagonar'...

Kaj viajn vortojn mi konservas en memoro,
La varmon de la man' kaj brilon de l'okul'.
Kaj jen eksonos tuj la lasta jam sonoro,
Kaj mia vagonar' perdiĝos en nebul'.

Foriris vagonar', ĝin glutis blanka fumo.
Viola duonlum' ĉirkaŭas nokte min.
Kaj restis sola vi en trista duonlumo;
Sed firmas nia am', mi scias, amikin'.

Tradukis Bonifatio Tornado (Boris Tokarev), meze de 1960-aj jaroj

Siringa nebular'

Siringa nebular' trankvile preter glitas,
Kaj super la vagon meznoktas luna flam'.

Ne hastas konduktor', li certe ne hezitas,
Ke kun fraŭlino mi disiĝas por ĉiam'.

Malgajas la rigard', manpremo specifika,
Ĉu mi forvenos nun por jaro aŭ por pli,
Sed eble por ĉiam' vi perdos la amikon,
Tuj sekvos fajfsignal' kaj forveturos mi.

La lastan “pardonpet’...” la buŝo kara flustras,
 En grandokuloj nur multegas la angor’,
 Tuj sekvos la signal’, kaj stacidom’ ekmutos,
 Ĉar strebos vagonar’ al la siringa for’.

Siringa nebular’ trankvile preter glitas,
 Kaj super la vagon’ meznoktas luna flam’,
 Ne hastas konduktor’, li certe ne hezitas,
 Ke kun fraŭlino mi disiĝas por ĉiam’.

Tradukis Gennadij Ŝilo, 1993

Adiaŭo

Moderato

The musical score for "Adiaŭo" is written for piano in G minor (three flats) and 3/4 time. It is marked "Moderato" and begins with a dynamic of *mf*. The score consists of five systems of music, each with a treble and bass clef staff. Chords are indicated by letters: Cm, Fm, G7, and Eb7. A watermark "notedigital.com" is visible across the middle of the score.

La dua prezentata hodiaŭ kanto aperis ankaŭ en 1950-aj jaroj. Ĝin konas preskaŭ ĉiuj, kaj kantas ĉe tabloj, lignofajroj, en vagonoj... La unuan fojon la kanto sonis en nuntempe forgesita filmo “Nuboj super Borsko” en 1960, kiam ĝin plenumis vira (!) ĥoro kun akompano de du gitaroj. La muzikan prilaboron faris komponisto Aleksej Muravlov, kaj pro tio oni en certaj fontoj nomas lin aŭtoro de la kanto. Tamen mem la komponisto neniam atribuis al si la aŭtorecon, li uzis hazarde aŭskultitan popolan kanton kaj adaptis ĝin al la taskoj de la filmo. Do, vera popola

kanto sen difinitaj aŭtoroj. Indas aldoni, ke ĝi sonis ankaŭ en pli bone memorata filmo “Pluvo en fremda urbo” (1979) kaj ĝin ofte plenumas famaj kantistinoj.



Виновата ли я?..

Виновата ли я, виновата ли я,
Виновата ли я, что люблю?
Виновата ли я, что мой голос
дрожал,
Когда пела я песню ему?

Целовал-миловал, целовал-миловал,
Говорил, что я буду его,
А я верила все и как роза цвела,
Потому что любила его».

“Ой, ты, мама моя, ой, ты, мама моя,
Отпусти ты меня погулять!

Ĉu mi kulpas?..

Ĉu mi kulpas aŭ ne, ĉu mi kulpas aŭ ne,
Ĉu mi kulpas, se lin amas mi?
Ĉu mi kulpas, ke tre tremis tiam la
voĉ’
Kiam kantis mi kanton al li?

Kisis min kun kares’, kisis min kun
kares’
Al mi diris, ke amas nur min,
Kaj mi kredis al li, floris mi kiel roz’
Ĉar mi de tuta kor’ amis lin.

“Oj, vi, mia patrin’, oj, vi, mia patrin’,

Ночью звёзды горят, ночью ласки дарят,
Ночью все о любви говорят».

«Виновата сама, виновата во всем,
Ещё хочешь себя оправдать!
Так зачем же, зачем в эту лунную ночь
Позволяла себя целовать!?»

Виновата ли я, виновата ли я,
Виновата ли я, что люблю?
Виновата ли я, что мой голос дрожал,
Когда пела я песню ему?

Nu forlasu promeni vi min!
Nokte stel' brulas jam kaj kares' kiel
flam',
Nokte ĉiuj parolas pri am' ».

“Estas kulpa vi mem, estas kulpa vi mem,
Estas kulpa vi mem, karulin’!
Kial do, kial do, kial en luna nokt’
Vi permesis, ke li kisu vin!?”

Ĉu mi kulpas au ne, ĉu mi kulpas au ne,
Ĉu mi kulpas, se lin amas mi?
Ĉu mi kulpas, ke tre tremis tiam la voĉ’,
Kiam kantis mi kanton al li?”

*Tradukis Semen Vajnblat,
10.09. 1979 j.*

Vivace *mf* **Chu mi kulpas au ne?**

The musical score is written in G major, 2/4 time, with a tempo marking of 'Vivace' and a dynamic marking of 'mf'. It consists of four staves of music. The first staff begins with a treble clef, a key signature of one sharp (F#), and a 2/4 time signature. The melody starts on G4 and moves through A4, B4, C5, B4, A4, G4. The lyrics 'Ви-но - ва - та ли я, ви-но - ва - та ли' are written below the notes. The second staff continues the melody with notes G4, A4, B4, C5, B4, A4, G4, F#4, E4, D4, C4. The lyrics 'я, ви-но - ва - та ли я, что люб - лю? Ви-но -' are written below. The third staff continues with notes G4, A4, B4, C5, B4, A4, G4, F#4, E4, D4, C4. The lyrics '- ва - та ли я, что мой го - лос дро - жал, ког - да пе - ла я' are written below. The fourth staff features a first ending (1.) with notes G4, A4, B4, C5, B4, A4, G4, F#4, E4, D4, C4, and a second ending (2.) with notes G4, A4, B4, C5, B4, A4, G4, F#4, E4, D4, C4. The lyrics 'пес - ню е - му? Ви - но - // - му? Ви - но - // - му?' are written below. A repeat sign with a first ending bracket is present at the end of the fourth staff.

Ви-но - ва - та ли я, ви-но - ва - та ли
я, ви-но - ва - та ли я, что люб - лю? Ви-но -
- ва - та ли я, что мой го - лос дро - жал, ког - да пе - ла я
пес - ню е - му? Ви - но - // - му? Ви - но - // - му?

Danĝeraj rimoj

Birdetoj ĝoje grajnojn bekas,
kaj super ni flugante... kantas.
Ho, niaj streboj tiom vantas!
Ni homoj tiom multe pekas!

Mi, admirante herban verdon,
surpaŝis akcidente... kardon.
Necesas havi ja singardon,
por dum promen' ne riski perdon.

Tra teleskop' en kosma spaco
videbla estis ruĝa... luno.
Kaj ĝi al iuj ŝajnis puno,
de l' mondofino la minaco.

Fraŭlin', vidante luksan riĉon,
al la sinjor' prezentis... peton,
ke li donacu braceleton,
al ŝi farante la feliĉon.

Johan' kaj Manjo tre amikas,
kaj ili ofte kune... sidas:
Johan' trankvile televidas,
kaj Manjo intertempe trikas.

Jen instruisto en lernejo,
la fizikist' – li estas... saĝa,
Ĉar kvankam estas li samaĝa
kun mi, li membras jam en TEJO.

Dum romantika aventuro
abunde gutis mia... ŝvito.
Ja mi ne estas emerito,
bonordas dume la naturo!



Valentin Melnikov

1-a premio en branĉo "humuro" de la konkurso EKRA (Razgrad, Bulgario) 2017.

CERBE kaj KORE

n-ro 8 (76), majo 2019

Kultura suplemento al Bulteno de REU (BdR) n-ro 104

*BdR estas oficiala informilo de la tutrusia socia organizaĵo
"RUSIA ESPERANTISTA UNIO"*

*Oni rajtas uzi kaj represi ĉiujn materialojn de la eldono nur kondiĉe de
ĝusta indiko de la fonto*

CkK atendas viajn prozajn, poeziajn, interlingvistikajn, instru-
metodikajn kaj scienc-popularajn kontribuojn! Bonvolu sendi ilin al
Nikolao Gudskov nikolao@yandex.ru .

Estraro de Rusia Esperantista Unio